Horizon-TAAL

Jaargang 48 - nummer 277 januari - februari 2016



Esperanto-grupo “La Progreso“ el Gento vizitis dum sia monata kulturkunveno la gaŭlan farmbienon (Destelbergen).



www.esperanto.be

Met steun van de Vlaamse Gemeenschap

INHOUD

Tweemaandelijks tijdschrift, uitgegeven door de Vlaamse Esperantobond v.z.w.
47ste jaargang - september-oktober 2015
Verschijnt de 1ste van elke oneven maand.
Overname van artikelen is vrij op voorwaarde dat de bron wordt vermeld en een exemplaar aan de redactie wordt gestuurd

Redactie en administratie: Vlaamse Esperantobond v.z.w. - Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
tel.: 03 / 234 34 00 - Epost: horizon.taal@esperanto.be
webstek: http://www.esperanto.be/fel/nl

Abonnementen: 25,00 EURO

Rekeningen: t.n.v. Vlaamse Esperantobond, Antwerpen
KBC IBAN BE31 4025 5105 3155, BIC: KREDBEBB
de Post IBAN BE66 0000 2653 3843, BIC: BPOTBEB1

Redactie: Pieter-Jan Doumen

Tekstopmaak: Eriko D'Hondt

Medewerkers: Marc Cuffez, Ivo Durwael, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, André Ruysschaert, Jean-Pierre Van den Daele, Emiel Van Damme, Kris Panis, Mireille Storms, Ivo Vercammen e.a.

Verantwoordelijke uitgever: Pieter Jan Doumen, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

TEN GELEIDE

Beste Lezers en Lezeressen,

Bij het begin van het nieuwe jaar 2016 wens ik u allemaal een goede gezondheid en veel succes toe in al uw ondernemingen, maar ook veel moed en levensvreugde ondanks de sombere berichten over het wereldgebeuren, die ons via radio en televisie bereiken. Het is niet mogelijk en ook niet gezond zich alles aan te trekken wat er in de wereld gebeurt. Het is altijd zo geweest en het zal altijd zo blijven. Positief denken en zich inzetten voor iets – o.a. voor Esperanto – blijft nog altijd de beste manier om optimistisch te blijven en zijn glimlach te bewaren.
Dat wens ik u allemaal ook toe bij dit nieuwe begin.

Pieter Jan Doumen, Hoofdredacteur.

LA TEZO DE LA HINDO-EŬROPA LINGVO

La vera senco de la vortoj estas tiu kiu ĉeestis en la momento de ilia kreado. La serĉado de la origino de la lingvo komenciĝas do kompreneble per la etimologio. La vorto "etimologio" estas malnovgreka vorto, ετυμολογια, kiun Cicero tradukis en la latinan per "veriloquium", kiu laŭlitere signifas "veran parolmanieron", nome "la veran sencon de vorto" aŭ "tio kion signifas vorto".
La vorto etimologio aperas nur en la unua jarcento antaŭ nia erao, sed la prizorgemo kiun ĝi kaŭzis estas pli maljuna, nome la fundamenta tendenco de la homa menso defendi sin kontraŭ la arbitra impreso de malofta vorto, ligante ĝin kun alia pli familiara kaj certe pli malnova.
Oni scias, ke la eŭropaj alfabetoj ĉiuj devenas de la greka alfabeto, kaj ke tiu ĉi devenis de la fenicia. La fama germana *ch* (ekz. en *Milch*) ne prezentas la saman sonon kiel la franca *ch* (ekz. en *chocolat*) kaj la angla *ch* (ekz. en *cheese*), kaj la *j* prezentas diversajn sonojn en diversaj lingvoj. Oni tamen ne devas esti specialisto por rekoni la ekziston de komuna origino kaj por identifi la klaran dividon inter la alfabetoj ligitaj al Romo kaj tiuj kiuj ekestis en la orbito de Bizanco. Eblas do komuna fonetika analizo. La simileco inter la angla *milk*, la nederlanda *melk* kaj la germana *Milch* kondukis al la ideo de la ĝermana radiko *mlek* (lakto).
La samvaloreco de senco inter la latina *massa* (pasto) kaj *macerare* (malsekigi) kun la greka μασσειν (pron. massejn, *knedi*) permesas ligi ĝin kun la malnovsaksa *makôn* (fari el tero, konstrui el lomo) aŭ *majko* (tiu kiu faris tiun laboron), en kiu ni vidas la francan *maçon* (masonisto) kaj la germanan verbon *machen*, la nederlandan *maken* kaj la anglan *make*, kiuj signifas fari, fabriki, kaj en kiuj ni povas vidi la tuteŭropan radikon MAK/MAG, kiu origine signifis "knedi substancon kun akvo".
Sub tiu rubriko oni trovas ankaŭ la francajn *magma, macération, amasser*, la italajn vortojn *macerazione, macereto, masselo, masso*, la portugalajn vortojn *maciço, maçar, mação*, kaj la rusajn vortojn *mjéssitj* (knedi), *smiéss* (miksaĵo), *mokrij* (malseka) kaj *muka* (faruno), se citi nur kelkajn ekzemplojn.
Sed ne sufiĉis konstati la ekziston de komunaj radikoj inter la eŭropaj lingvoj. Oni ankaŭ devis ekspliki ilian aperon. Tiel naskiĝis la tezo de la hind-eŭropa lingvo: la radikoj evidentiĝis komunaj sekve de komuna etna origino kaj komuna lingvistiko.
Antaŭiranto aperis ekde 1767 en la persono de la franco P. Coeurdoux , kiu sendis memorandon al abato Barthélémy kaj la aliaj membroj de la *Akademio de Beletro kaj Epigrafoj*. La demando tekstis: "Kiel fariĝis, ke en nia lingvo troviĝas granda nombro da vortoj kiujn ĝi havas komunaj kun la latina kaj la greka lingvoj ?"
Sed la membroj de la Akademio ne komprenis la gravecon de tiu demando kaj ne reagis. Estis la anglo William Jones kiu interesiĝis pri la temo. En 1786 li deklaris dum parolado en Kalkato: "La lingvo sanskrita, kia ajn estas sia antikveco, havas miraklan strukturon: ĝi estas pli bela ol la greka, pli abunda ol la latina, havas

pli rafinitan kulturon ol ambaŭ lingvoj. Ĝi tamen havas kun ambaŭ lingvoj tiel proksiman parencecon koncerne la vortradikojn kaj la gramatikajn formojn, ke tiu parenceco ne povas esti la produkto de la hazardo."

Necesis la studoj entreprenitaj de Frederik Schlegel en la universitato de Heidelberg kaj lia libro "La lingvo kaj la saĝeco de la hindoj", aperinta en 1808, por doni al kompara lingvistiko universitatan statuson. Lia disĉiplo Franz Bopp (1791-1867), en sia monumenta "Komparataj gramatikoj de la lingvoj sanskrita, zenda, greka, latina, litova, antikslava, gota kaj ĝermana", disponigis al ĉiuj detalan studon el kiu evidentiĝis, ke ĉiu hindeŭropa lingvo estas branĉo de sama lingvistika arbo.

Por Bopp, kiel por la dano Rasmus Rask kaj por la germano Jakob Grimm, la gramatiko suficîs por montri, ke ekzistas komuna historio de la lingvoj. Ilia parenceco estas la sekvo de komuna deveno. Tiel unu lingvo naskis aliajn lingvojn, kiel la latina naskis la francan, la italan, la hispanan kaj la portugalan, elirante mem de fundamenta lingvo, de kiu ankaŭ la sanskrita estas nur derivita formo. En siaj "Analoj de orienta Literaturo" (1820) Bopp deklaras : "Mi ne kredas, ke la greka, la latina kaj la ceteraj lingvoj de Eŭropo derivis de la sanskrita. Mi plie emas konsideri ĉiujn tiujn lingvojn kiel laŭgradajn ŝanĝiĝojn de unu sola origina lingvo. La sankrita ŝajnas esti pli proksima al tiu lingvo ol ĝiaj samspeculoj. Sed ekzistas ekzemploj de gramatikaj formoj kiuj perdiĝis en la sanskrita sed konserviĝis en la greka kaj la latina."

Tiu ĉi tezo estas ankoraŭ hodiaŭ la oficiala tezo en la universitatoj. Oni instruas la ekziston de lingvo-patrino, ia neskribata prehistoria lingvo, parolata en la tria jarmilo antaŭ nia erao.

Efektive, de Hindio ĝis Irlando interalie la parencecaj nomoj forte similas inter si. Tiel la franca vorto *mère* estas en antikva hinda *matar*, en la malnovgreka *mètèr*, en la latina *mater*, en la gota *mothar*, en la antikva irlanda *mathir*, kaj en la rusa *matj*. Ĉar pruntoj estas ekskluditaj inter lingvoj parolataj en tiel distaj lokoj kaj tempoj unuj de la aliaj, tia simileco povas esti nur la sekvo de komuna heredaĵo. Sed ne estas natura aŭ necesa ligo inter la formo kaj la senco de la vortoj.

Oni ŝajnas ne plu koncedi la eblecon de alia eksplikо. Tamen M.J. Haudry certigas, ke la hindo-eŭropa "estas lingvo, kies ekzisto oni devas supozi ", kaj li ne hezitas konfirmi ke "ĝia rekonstruo estas tiel certa kiel la priskribo de viva lingvo". Sed kial oni povas paroli pri scienca teorio malgraŭ la foresto de observeblaj faktoj? Malgraŭ Bopp, kiu uzis la vorton "hind-eŭropa", la germana tradicio gardis la nocion "hindo-ĝermana".

El la reala simileco inter pluraj lingvoj, oni derivis la ekziston de lingvistika familio. Volante ekspliki tiun familion per la hipotezo de primitiva baza tavolo, oni transiris al la invento de etno kies ekziston neniu historia dokumento pruvas. Scienco tamen postulas pruvojn. Antaŭ la neceseco doni materiajn pruvojn por montri la iaman ekziston de hind-eŭropanoj, oni provas paroligi arĥeologion.

D. Tassot, el *Science et Foi*
(daŭrigote)

NI SEMAS, NI RIKOLTAS

Sub tiu titolo la oktobra revuo *Esperanto* anoncis novan programon de UEA : "Ni semas". Tiu programo celas kuraĝigi al etaj projektoj, plenumataj de homoj eventuale agantaj ekster la rektaj strukturoj de nia Asocio. Ĝi regule invitas proponojn pri tiaj etskalaj, sed valoraj projektoj, kiuj iel plenumas la celojn de nia Strategia Plano kaj kiuj por sukcesi eble bezonas tian "sem-monon".

Kvarfoje jare UEA anoncas konkurson kun la limdatoj 31-a de marto, 30-a de junio, 30-a de septembro kaj la jarfino. Prijuĝos la recivitajn proponojn kvarpersona grupo, konsistanta el konsilianoj. Tiuj preparos rekomendojn por la estraro, kiu faros la finan decidon.

La ideo por la programo ni efektive ŝtelis de TEJO. Jen la valoro de reciprokaj observantoj en niaj estrarkunsidoj kaj la proksimaj (kaj proksimiĝantaj) rilatoj inter UEA kaj TEJO. La simila programo ĉe TEJO, ankoraŭ funkcianta, nomiĝas "Trampolino". Nia Afrika Komisiono (AK) ekde 2016 lanĉos similan konkurson por landaj kaj lokaj asocioj sur la kontinento.

La rekomendan teamon konsistigas Huang Yinbao (kromnomata Trezoro) el Ĉinio, Zsófia Kóródy el Germanio, Michela Lipari el Italio kaj Francesco Maurelli el Germanio. Kiam venos proponoj el Afriko aŭ Ameriko, ili povos peti konsilojn de la kunordigantoj de la koncernaj regionaj komisionoj de UEA.

Nun UEA anoncas la unuan konkurson, kun elpaga valoro de cent eŭroj. Petu informojn kaj la petilon de "Ni semas" <ĉe>co.uea.org. Poste ni konigos retejon kun la normigita petilo, la programajn regularon kaj klarigaron. La limdato por resendo al tiu sama adreso estos la 31-a de decembro 2015. Petoj akcepteblos el landaj kaj fakaj asocioj, E-centroj, urbaj kluboj kaj grupiĝoj plene ekster la ombrelo de UEA. El homoj ajnaĝa,j en ajnaj mondpartoj. La ĉefa kriterio estos la potenciala utilo kaj realigeblo de la projekto. Sekve, ne restu sennoma, kiam eblas ricevo semmona! (Stefan McGill)

AFRIKA KONGRESO DE ESPERANTO

Jen utilaj kontaktoj pri la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto, okazonta en aŭgusto 2016 en Rumonge, Burundo, de la 13-a ĝis la 20-a de aŭgusto 2016, en la Pentekosta Centro fronte al la lago Tanganjiko, ĉ . 70 km de la ĉefurbo Buĵumburo. La 3-a Afrika AMO-Seminario okazos kun du komunaj tagoj de AK6, aranĝo preparata de la Afrika Komisiono kaj la Burunda Asocio de UEA. Pliaj informoj pri la ejo, kostoj kaj aliĝo kaj la AKE-programo afiŝeblas en www.esperanto-efiko.org .

Oficiala retejo : http://www. Esperanto)afriko?org/ kaj elektu AKE6 en 2016.

Detala programo estas rigardebla en la oficiala retejo. Komuniko de UEA pri la kongreso: http://www.uea.org/aktuale/Komunikoj/2015/6-a- Afrika-Kongreso-de-Esperanto-okazos-en-Burundo-en-2016 . (Stefan McGill)

PROGRESO ĈE LA KONSILIO DE EŬROPO

Raporto de Katalina Kovats : "La Eŭropa Centro de Modernaj Lingvoj (filio de la Konsilio de Eŭropo) akceptis plian dokumenton de ni kaj ĵus sendis al ni la Esperanto-version de la ĉi-jara kampanjo-broŝuro, kies tekston ili ricevis antaŭ kelkaj semajnoj. Ĝi aperos inter la aliaj lingvoj, dekstre sube sur ilia ĉefpaĝo http://edl.ecml.at/ . Ni esperas, ke baldaŭ ni povos paŝi pli antaŭen, ĉar ankaŭ aliaj tradukoj estis senditaj por ke ilia paĝaro pli kaj pli ofertu erojn en Esperanto. La nuna sukceso estas la rezultato de plurjara laboro kaj lingvopolitika agado. Sed certe multe helpis, ke pli ol tridek Esperanto-aranĝoj estis registritaj en la pasintaj tagoj en la evento-kalendaro de la paĝaro, kaj dekoj da personoj plenigis la memtaksilon pri siaj Esperanto-konoj". (Stefan MacGill)

"ESPERANTO" RULIĜOS TRA POLLANDO

La pola ŝtata fervoj-entrepreno akceptis la trajnonomon "Esperanto". En la fino de la voĉdonado, anoncita semajnon antaŭe, la nomo Esperanto havis 3940 voĉojn, la nomo Narew 2509 voĉoj, Boajry 200 voĉojn. La interurba rapidtrajno IC Esperanto funkcios ekde decembro, kaj denove aŭdeblos la nomo "Esperanto" en polaj stacidomoj. Pli frue jam funkciis trajno kun la sama nomo inter Bjalistoko kaj Varsovio, sed ĝi estis nuligita en junio 2013, ĉar uzis ĝin ne sufiĉe multaj pasaĝeroj.

Ni tutkore dankas al la verdaj brigadoj, kiuj tiel rapide kaj efike mobilizis sin! Via voĉdonado multe helpis en la diskonigo de Esperanto en la pola ekstermovada medio. Sen via helpo la sukceso ne estus atingita ! (Stefan McGill)

LINGVO-INFO INTER LA PLEJ BONAJ GERMANLINGVAJ RETEJOJ

Lingvo-info, lanĉita pasintjare, estas multlingva retejo celanta al informado pri eŭropaj lingvoj. Ĝi estas disponebla en 21 lingvoj, interalie en Esperanto. La projekto estas subvenciata de la Eŭropa Komisiono ekde decembro 2012. La retejon kreis teamo konsistanta el naŭ partneroj kaj ĝin gvidas la Eŭropa Esperanto-Unio. En Germanio ĝi estas nomumita por iĝi "retejo de la jaro 2015" en la kate-gorio "edukado kaj kariero". Vi povas helpi al la projekto kaj EEU voĉdonante ĉe:

http://websitedes jahres.de/lingvoinfo/ .Verdaj brigadoj: ek al la nova defio ! (Stefan McGill)

EŬROPA TAGO DE LINGVOJ EN KROATIO

La denaska esperantistino Maja Tišljar havis intervjuon por matena programo en la kroata TV, kaj parolis pri Esperanto, ŝia traduko en Esperanton de kroata infanlibro kaj la senpaga lernado de lingvoj per la programo de lingvo@info, inspirita de la Esperanto-portalo lernu.net.
La 29-an de septembro Spomenka Štimec surbendigis radioelsendon pro la programo "Lingvoj kaj antaŭjuĝoj". Radioĵurnalistino Sonja Šarunić preparas prilingvan intervjuon kun esperantistino D-ro Domagoj Vidović. Judita Rey Hudeček iniciatis partoprenon de gejunuloj el la Studenta Esperanto-Klubo en la Eŭropa Tago de Lingvoj, festita per starigo de tendo sur la Eŭropa placo, kie multaj lingvoj estis instruataj, interalie ankaŭ Esperanto. Kun Judita Rey Hudeček helpinstruis Andrea Horvat kaj Filip Mikuličić. (Stefan McGill)

SPECIAAL NUMMER VAN DE KRANT INDECS GEWIJD AAN ESPERANTO

The Phenomenon of Esperanto is de titel van een speciaal nummer van de krant *Interdisciplinary Description of Complex Systems* (INDECS), onlangs uitgegeven in Kroatië. De collectie van prof. Humphrey Tonkin en D-ro Veronika Poór, is het nummer twee van boekdeel 13 van INDECS (2015). De collectie is opgesteld in het Engels met resumés in het Kroatisch.
Het gaat om tien artikels en een uitgebreide academische beschrijving van de internationale taal Esperanto, samen met een recensie van prof. Humphrey Tonkin (universiteit van Hartford, V.S.A.). Sabine Fiedler (universiteit van Leipzig) draagt bij tot de fraseologie van het Esperanto. Wim Jansen (universiteit van Amsterdam) onderzoekt de spraakkunst van het Esperanto, en Duncan Charters (Kolegio Principia, V.S.A.) doet een onderzoek inzake het onderwijs van het Esperanto.
De functie van het Esperanto als plantaal wordt behandeld in vier artikels. Ilona Koutny (universiteit Adam Mickiewicz, Polen) onderzoekt de vraag of complexiteit kan worden gepland, en Detlev en Wera Blanke (Vereniging voor Interlinguïstiek) onderzoeken de geschiedenis en het potentieel van het Esperanto als taal voor academische communicatie. Humphrey Tonkin stelt zich daarbij de vraag hoe een onderzoek inzake plantalen kan worden toegepast op taalplanning in het algemeen.
Sho Konishi (universiteit van Oxford, Engeland) stelt een specifieke analyse voor inzake de bijzonder interessante vraag in de geschiedenis van de ideeën, namelijk hoe het Esperanto en gerelateerde ideeën over taaldemocratie het denken en de politiek in de diverse werelddelen beïnvloeden.
De vraag omtrent de uitbreiding en de levenskracht van de Esperantobeweging wordt onderzocht in twee artikels, die tot heel verschillende conclusies leiden. Krunoslav Puškar (universiteit van Zagreb) onderzoekt de kerngedachten van de slinkende traditionele Esperanto-beweging in Kroatië, terwijl Amri Wandel (Hebreeuwse universiteit, Jeruzalem) de snelle wereldwijde verspreiding van het Esperanto via het Internet onderzoekt, waarbij hij de verdeling tussen de traditionele structuren en de nieuwe toegang tot het Esperanto via het internet en zijn gebruik door jonge personen en gebruikers onderzoekt, die niet aangesloten zijn bij de traditionele Esperanto-organisaties.
INDECS wordt uitgegeven in Zagreb door de Kroatische Interdisciplinaire Vereniging met steun van het Kroatische Ministerie voor Wetenschappen, Opvoeding en Sport. De artikels kunnen gelezen worden bij www.indecs.eu en het papieren nummer kan verkregen worden bij de Universala Esperanto-Asocio (UEA) in Rotterdam (www.uea.org).

FONDS VANBIERVLIET

Gezocht en gevonden in het Fonds Vanbiervliet: Arturo Alfandari

Arturo Alfandari (1888-1969, eo.wikipedia.org/wiki/Arturo_Alfandari) was een Belg van Italiaanse afkomst. Gedurende tientallen jaren heeft hij gewerkt aan een plantaal, Neo. Het eindresultaat publiceerde hij in de jaren 1960 bij de uitgeverij Brepols. Deze boeken zijn nog probleemloos in verschillende bibliotheken te vinden.

Een Russische onderzoeker die een studie wijdt aan de plantaal Neo was echter nog op zoek naar het eerste project van de taal, door de auteur in eigen beheer uitgegeven in 1937: *Méthode pratique de Neo, langue auxiliaire*. Het Esperanto-Fonds Cesar Vanbiervliet in Kortrijk bleek, misschien als enige, in het bezit te zijn van dit werk. Een pdf-versie ervan werd ondertussen opgestuurd naar Rusland (en kan door andere geïnteresseerden ook geraadpleegd worden op http://1drv.ms/12l2az9 - de site waar alle gedigitaleerde documenten van het Fonds verzameld zijn).

Er blijven nochtans enkele werken onvindbaar: de uitgaven van *Les Amis de Neo*, een Brusselse vzw opgericht in 1962 met een laatste teken van activiteit in 1968. Het betreft een tijdschrift en het boek *Mil e un vortos de Neo* van G. Vignal. Alle informatie hierover is welkom.

Roland Rotsaert

HALOVENAĴOJ

Ĵaŭdon vespere la 15-an de oktobro 2015 la Erikeja rondo denove kunvenis en la paroĥa centro en 2920 Heide-Kalmthout.
Nun estis la temo "Haloveno". Sesope ni volis komenci ĉi tiun vesperon per allogo de kukurba supo.
La grupo kunvenis en nia kutima salono, sen du malhelpintaj membroj.
Tiam alvenis la grava figuro de la vespero, Nicky el Antverpeno.
Unue ŝi devis transvesti sin. Tio montris ke ne aktuala kaj eksterordinara vestajo apartenis al la figuro kiun ŝi reprezentis. Jes, kiun figuron? Mi mem ne bone konas la feston de "Haloveno". Ĝi estas usona festo: el tio montriĝas ke usona kulturo havas grandan influon kaj disvastiĝas al aliaj mondopartoj.
Nicky do vestiĝis kiel …sorĉistino kun nigraj vestoj kaj alta pintforma ĉapelo.
Sed pli grava estis kion ŝi prezentis.
Ŝi komencis rakonti laŭ speciala maniero, jen laŭte kun krioj, jen flustranta.
La rakonto mem mi ne povis tiom bone sekvi. Oni devis koni la historion antaŭe.



Sed kion la "sorĉistino" rakontis estis bazita laŭ ŝi sur pasintaj rakontaĵoj: legendoj
Ŝi referencis al literaturaĵoj pri ĉi tiu temo. Denove ni spertis agrablan kaj unikan E°-vesperon.
Bonvolu rimarki sur la foto : maldekstre nia sorĉistino, plue mi Simon, Maria, Rien, Rob kaj Mireille

DEN VADERLAND GETROUWE

Een half jaar geleden brak een artikel in De Standaard een lans voor het gebruik van het Nederlands in plaats van gebrekkig Engels in het hoger onderwijs.
De auteur is de Nederlander Ad Visser, hoofddocent sociale en culturele filosofie aan de Vrije Universiteit van Amsterdam. Visser hamert el een tijdje op deze spijker.In juni 2014 kreeg hij al twee bladzijden in het NRC-Handelsblad om het universitair onderwijs in Nederland te hekelen. Hij gooide toen zijn netten nog wat wijder uit om het geheel van de verloedering aan de Nederlandse universiteiten aan te klagen. Hij kreeg de enthousiaste steun van nogal wat studenten, die hun eigen "nonderwijs" hekelden. Als voorzitter van de vereniging Beter Onderwijs Nederland timmert hij al een hele tijd aan die weg. Een paar weken geleden publiceerde hij in hetzelfde dagblad "De actiepunten van het groot manifest der Nederlandse taal". Het was ondertekend door vijfentwintig Nederlandse en een paar Vlaamse prominenten uit de academische en literaire wereld, onder meer door de bekende hoogleraar Frits van Oostrom (Maerlants Wereld) en de publicist Paul Scheffer (Het Multiculturele Drama).

Respect voor de wet
De ondertekenaars eisen dat artikel 7.2 van de Wet op het Hoger Onderwijs gerespecteerd wordt. Dat zegt klaar en duidelijk dat onderwijs en examinering in het Nederlands moeten gebeuren, tenzij er goede redenen zijn om daarvan af te wijken, bijvoorbeeld voor een specialistische research master.
Ze klagen de haast totalitaire invoer aan van het Engels als voertaal in het hoger onderwijs. Op dit ogenblik wordt in Nederland al het grootste deel van de masteropleidingen aan de universiteiten in iets gedoceerd dat op het Engels gelijkt. In het Hoger Beroepsonderwijs is dat nu al zo'n 20 procent. Natuurlijk is dat geen echt Engelsn, maar globish. Dat wil zeggen dat docenten en studenten ongeveer 1500 woorden en uitdrukkingen kennen, die al passe-partout gebruikt worden. Ondergetekende heeft een diploma als leraar Engels, schrijft al tientallen jaren artikerls in die taal en ontdekt iedere keer weer dat ze helemaal niet eenvoudig is.
Maar vertel dat eens aan veel Nederlandse docenten. Nederlanders staan vlug op de bres om hip en modieus te zijn. Ze hebben angst om "de trein te missen die maar één keer passeert". En in hun allerindividueelste zoektocht arriveren ze toch allemaal bij hetzelfde eindstation. De angst om proviciaal genoemd te worden is voor de meeste Nederlandse onderwijsinstellingen een nachtmerrie. Soms lijkt het erop dat de meeste instellingen ijveren om zoveel mogelijk buitenlandse studenten aan boord te hijsen. Verbrugge stelt: "Dit gaat regelmatig ten koste van de opleiding, verzorgd in een gebrekkig Engels, dat niet de helderheid en nuances van de moedertaal bereikt, terwijl er misschien maar één enkele verdwaalde Chinees en een hippe Duitser op college is." Als die hippe Duitser fdilosofie studeert, dan moet hij aan veel Nederlandse universiteiten grote Duitse filosofen als Kant, Hegel en Heidegger, lezen in… het Engels!

Rendementsdenken
Naast het modieuze is ook het rendementsdenken één van de oorzaken van de globalisering. Weten-schappers proberen zo veel mogelijk te publiceren in Engelstalige tijdschriften, zelfs al leest maar drie man een en paardenkop het artikel. Boeken schrijven is bijna taboe, want dat vergt veel meer werk en de titel van een boek is niet langer dan eentje van een artikel van een paar bladzijden op dat cv. Geregeld wordt verwezen naar de middeleeuwen, toen het Latijn een lingua franca was, alsof we terug nqar de middeleeuwen moeten, toen een piepkleine elite het voor het zeggen had. Nederland is juist Nederland geworden omdat het massaal de Statenbijbel in de eigen taal las, terwijl Vlaanderen een land van klein versplinterde dialectjes werd zonder algemene taal, want de Kerk verbood die lectuur. Visser wijst ook op het asociale gevolg van het globish. Nauwelijks een paar procent van de studenten werkt later in een internationaal verband, maar inmiddels leveren instellingen medici, juristen, ambtenaren en bedrijfsleiders af die niet meer behoorlijk een tekst in hun eigen taal kunnen schrijven. "Wie zijn neus schendt, schendt zijn aangezicht", luidt het spreekwoord. Nederland heeft inderdaad weinig op met nationaal zelfrespect, zoals Visser het noemt. Benieuwd of zijn oproep enig succes zal boeken bij de politici die over die zaak gaan beslissen. Keert de wal het Engelse schip?

Raymond Schwartz (1894-1973). Franca bankdirektoro. Esperantisto de 1909. En Metz li fondis en 1913 Esperanto-grupon. Li gvidis la famajn Esperanto-Kabaredojn "Verda Kato" (1920-26), "Bolanta kaldrono" (1936-39) kaj "Tri Koboldoj" (1944-56) en Parizo. Bona poeto, ankaŭ konata kiel kunlaboranto de pluraj Esperantaj revuoj.

Esperantisto, ekesto kaj malapero° *verdwijning*

Gazetartikolo
Aŭ varba° parolo. *wervend*
Favora impreso,
Ekintereso. *ek= begin*
Lernolibro,
Sankta vibro°, *trilling*
Propaganda miasmo°; *moerasdamp*
Entuziasmo!
Samideano°, *geestverwant*
(Je via sano!)
Kamarado,
Varbado°, *het werven*
Instruo°, *onderwijs*
En butontruo° *knoopsgat*
Verda°flago, *groen*
Glora tago!
Plua° ŝtupo° *verdere stap (fig.)*
Nova grupo. .
Nova sento,
Facila° vento° *zachte wind*
Kaj poemo
Pri sama temo!
Post hezito
Delegito°. *afgevaardigde*
Laŭ bezono° *volgens behoefte*
Gazetabono,
Kotizoj *lidgeld*
Kaj valizoj
Por kongreso.
Miraklimpreso!
Fraka° vesto, *rokjas*
Bala festo,
Naci-kostumo,
Amindumo°. *flirten*
Hispanino°, *spaanse*
Korinklino° *neiging van het hart*
Kaj esperoj
Amleteroj°. *liefdesbrief*
Mielo°, *honig*
Cielo!
………………………………………………………
………………………………………………………
Edzino°; *echtgenote*
FINO!! (1929)

PRI LA POEMO

Versoj 1-2. Gazetartikolo Aŭ varba parolo.
Pri kio tiuj versoj parolas?
Pri la lingvo Esperanto.
Kio povas esti la fonto° de tiu varba parolo? *bron*
Eble ia artikolo en iu ĵurnalo° *dagblad*
aŭ eble amiko aŭ iu prelego°? *voordracht*
Esceptokaze° en la televido, *in uitzonderlijk geval*
pri iu° *een of andere*
kunveno° kiel la fama **Universala** *samenkomst*
Kongreso kiu okazis, inter krampoj,
ĉi-jare° en **Lille** (Francio). *dit jaar*
Ĉeestis° pli-malpli *aanwezig*
2400 partoprenantoj°! *deelnemer*
Ĉu iu leganto povus varbi° pli? *werven*
Parenteze°, leganto kun originala *tussen haakjes*
propono tiurilate° estas bonvena! *in dat opzicht*
Kio, en nia kazo, esperantistoj, povus esti bona 'varba parolo'?
Supozeble ĉiu havas siajn proprajn argumentojn tiurilate!
Tre verŝajne tiuj argumentoj
temos° pri... *handelen over*
la ebleco komuniki tutmonde kun samideanoj.

Verso 4. Ekintereso.
Jen plia reago al la informo.
ekintereso = interesiĝo
La prefikso **-ek** montras, ke la afero ...
komenciĝas. (Anstataŭ 'komenciĝi' oni povas uzi la verbon 'eki'!)
*Jen **tre utila** prefikso, kiu povas anstataŭi° verbon aŭ tutan esprimon!* *vervangen*
Ekzemple:
Oni povas ekdormi, ekvidi iun aŭ ion, ekami, ekmalami, silenti kiam iu ekparolas, ekrideti° kiam... *glimlachen*

Verso 5. Lernolibro,
Kion sugestas tiu vorto?
Sugestas tutan frazon aŭ eĉ tutan okazaĵon°, nome° ke ? *gebeurtenis; namelijk*
Pro interesiĝo, li decidis ...
aĉeti lernolibron.

Verso 6. Sankta vibro,
Vibro de kio?
Verŝajne° de lia koro! *waarschijnlijk*
Kion sugestas tiu vibro?
grandan entuziasmon, ĝojon°. *vreugde*
Eble ankaŭ admiron.
Ĉu la vorto 'sankta' ne estas troiga°? *overdreven*
Eble dirita 'kun salero°'? *zoutkorrel*

kp.: vibro *trilling*, tremo *beving.*

Kiam alie oni povas sperti° **vibron**? *ervaren*
eble pro...tertremo°. *aardbeving (tremi: beven)*
eble en la pianokordoj, sonorilo?
En la koro kiam...

Interkrampe, pro° kio vibrus ĉi-lasta? *wegens*
precipe pro emocio aŭ fizika streĉo°. *inspanning*

Verso 7. Propaganda miasmo;

Kio estas miasmo?
Malsaniga°, malbonodora, *ziek makend*
toksa gaso.
Kio estas 'toksa' gaso?
malsaniga, sandifekta° gaso *ongezond makend*
Kie plej ofte troviĝas tia miasmo?
en marĉoj°. *moeras*
Kion esprimas tiu vorto ĉi tie?
neklaran, konfuzan, nervozigan laboron.
Kial propagando estus 'miasmo'?
Propagando ofte supozigas multe da ...
laŭta kaj okulfrapa° agado. *opvallende*

Verso 8. Entuziasmo!

Pri kio tiu entuziasmo malgraŭ la propaganda miasmo?
La ĵus menciita 'miasmo' pri Esperanto do ne negative influis la entuziasman
eklernínton° de la lingvo. *die begonnen was te...*
La entuziasmo superis° la *overtreffen*
propagandan 'miasmon'.

Verso 9. Samideano, *geestverwant*

(samideano= ano° de la sama ideo). *lid*
Kiel kompreni tiun vorton ĉi tie?
Oni komprenu, ke li iĝis samideano. Jen tre
konciza°, lakona° informo! *beknopt; laconiek*
Kaj bela ekzemplo de la
esprimivo° de la lingvo *beeldend vermogen*
Esperanto!

Verso 10. (Je via sano!)

Kial tiu verso prezentiĝas
parenteze°? *tussen haakjes*
Verŝajne temas pri paroloj de iu alia,
diritaj kiam...
supozeble dum festo kiam li aliĝis° *z. aansloot*
al loka° esperantista grupo. *plaatselijk*
Kion tiu saluto fakte° esprimas? *in feite*
Plej korajn bondezirojn por la alparolata(j)
pri lia(iliaj) sanstato°. *gezondheidstoestand*

Verso 11. Kamarado,

Kiu? Kies?
Komparante kun versoj 9 kaj 10,
ni povas konkludi, ke post la festo li iĝis
kamarado de (la) aliaj (ge)membroj.
Lia aliĝo° estas do ne nur formala sed *aansluiting*
eĉ° ... amika. *zelfs*
Ĉu ne mirige°, ke tio jam okazas? *verwonderlijk*
Ne vere, ĉar... ?
Oni ĝojas ĉiam, kiam oni malkovras novan, veran amikon.

Verso 12. Varbado°, *het aanwerven*

Jen nova paŝo, nome?
La nova membro iĝas aktiva partoprenanto.
Eble la legantoj opinios, ke ties° evoluo *diens*
estas... mirige° rapida! *verbazend*
Iuj novuloj kelkfoje estas efektive° *inderdaad*
ege entuziasmaj kaj volas aktive partopreni en la disvastigo° de la ideo. *verspreiding*

Verso 13. Instruo°, *onderwijs*

Ĉu ne iom mirige, ke li jam instruas?
Ĉu vere temas ĉi tie pri fulmrapida° *bliksemsnel*
evoluo?
Ne necese. Oni komprenu, ke kelkfoje inter la versoj pasas iom da tempo!
La leganto komprenu laŭvole°! *naar believen*
Aliflanke estas fakto, ke ni emas° *geneigd zijn*
konvinki° aliajn pri ideoj, kiuj *overtuigen*
plaĉas° al ni. *bevallen*

Versoj 14-15. En butontruo° *knoopsgat*
Verda flago,

Ĉu butontruo ne estas iom tro malgranda por flago?
Temas ĉi tie pri... insigno, kiu publike montras
ke oni aliĝis° al la movado°. *toetreden; beweging*
Pro tia flago esperantistoj estas (kelk)foje nomataj verduloj. Kial tiu nomo estas nun iom ambigua°? *dubbelzinnig*
Pro la ekzisto de la verda politika partio kaj ties flago!

Verso 16. Glora tago!

Kion pensi pri tiu vorto 'glora'?
Ĉu jen ne vorto troiga°? *overdreven*
Tamen ĝi esprimas ankaŭ...
grandan ĝojon, esperon, perspektivon...

Verso 17. Plua° ŝtupo° *verdere; stap, trede (fig.)*

Ŝtuparon oni uzas i.a°. por iri de unu *interalie*
etaĝo al alia.
Figurasence troviĝas ŝtupoj en...
laboro, ludo, ĝojo, vivo...
La diferenco inter 'paŝo' kaj 'ŝtupo' estas...
en ŝtupo estas ideo de nivelo.
Ĉu estas diferenco inter 'plua' kaj 'plia'?
Plia signifas ... aldona° *bijgevoegd*
kaj **plua** ... en posta tempo.
Ekzemple:
En la plua° ekzerco oni trovos *verdere*
pliajn° ekzemplojn. *meer, bijkomend*

Verso 18. Nova grupo.

Kion montras la fakto, ke li malkovras novan grupon?
Ke li estas versajne interesita kaj volas malkovri pli pri la lingvo kaj la esperantistoj.
Eble li mem fondas novan grupon?

Verso 19. Nova sento,

Kio povas esti tiu nova sento?
Eble li spertas° ion alian en tiu ĉi *ervaart*
grupo? Estas fakto, ke ĉiu grupo havas...
sian propran etoson°. *stemming, ambiance*

Verso 20. Facila° vento° *zachte, goede wind*

Kio estas **facila** vento?
Vento senpene° moviĝanta, *moeiteloos*
rapide kaj libere iranta.
Kp. facila paŝo, irado
Kial la aŭtoro subite mencias° venton? *vermelden*
Eble la heroo de la rakonto sentas sin...
kontentige **kuntrenata**° pro *meegesleept*
la evoluo de la afero, alivorte, de la malkovro
de la esperantista mondo? Aŭ ĉu tiu mondo
donas al li novajn perspektivojn?
Notu bone: "Nova sento, facila vento" estas citoj el la himno "La Espero".

Verso 21. Kaj poemo

Kion montras tiu vorto?
Ke la aŭtoro estus fakte° poeto? *in feite*
Ĉu denaske aŭ simple laŭokaze°? *bij gelegenheid*
Ambaŭ eblas, sed la poemo montras, ke la
entuziasmo... lin inspiras!

Verso 22. Pri sama temo!

Jen do pruvo°ke la ideo de *bewijs*
Esperanto vibrigas°lin. *doet trillen, spreekt aan*
Noteto inter krampoj: Oni ne pensu, ke ĉiu entuziasmulo pri Esperanto estas/estu necese...
inspirita poeto!

Versoj 23-24. Post hezito Delegito.

Kio estas delegito°? *afgevaardigde*
Iu, kiu estas sendita kiel reprezentanto.
De kio aŭ de kiu li povas esti delegito?
Verŝajne de UEA.
Kial post hezito?
Tiu posteno supozigas pli da
respondeco° kaj laboro. *verantwoordelijkheid*

Versoj 25-26. Laŭ bezono Gazetabono.

Kian gazeton li abonus?
Tre verŝajne Esperanto-gazeton!

Verso 27. Kotizoj

Kion montras la pluralo 'kotizoj'?
Ke li jam abonis plurajn gazetojn aŭ revuojn.
Kion ĉio ĉi montras?
Ke li iĝas ege interesata kaj eĉ aktiva esperantisto.

Versoj 28-29. Kaj valizoj Por kongreso.

Kiel do evoluas lia
sindediĉo° al Esperanto? *toewijding (lett. het zich geven)*
Li iĝas ĉiam pli entuziasma kaj aktiva membro
de la movado°. *beweging*

Verso 30. Miraklimpreso!

Impreso de miraklo: ĉu ne nekredebla?
Eble jen impreso al novulo?
Veras°, ke tia internacia kunveno estas *'t is waar*
impona°. Des pli° impona, *indrukwekkend; des te meer*
ĉar esperantistoj kutime aktivas en ne grandaj lokaj kluboj. Kial tio?
Ĉar ili estas idealistoj, kaj do ne...
(ankoraŭ?) vere multnombraj°! *talrijk*

Versoj 31-32. Fraka vesto, Bala festo,

Kio fakte° estas **frako**°? *eigenlijk; rokjas*
Vira ceremonia vesto kun du mallarĝaj postaj
baskoj°. *slip*
Jen amuza difino de '**balo**' el PIV:
'Plezurkunveno, en kiu viroj kaj virinoj dancas kune.'
Notu la sinsekvon de la vortoj ! Sur kiu socia rango oni sekvas ĉi tiun kutimon?
Estas klare, ke ĉi tie temas pri sufiĉe alta socia rango.

Verso 33. Naci-kostumo,

Pri kies° kostumo temas? *wiens, van wie*
Eble iuj partoprenant(in)oj portas tian kostumon.
Kial ili penas° fari tion? *moeite doen*
Iuj ŝatas montri sin en tia kostumo, ĉu por
honori sian patrion, ĉu por kolorigi la feston.

Verso 34. Amindumo°. *het flirten*

amindumi = peni esti aminda.
peni plaĉi al iu, eble ankaŭ pro seksaj motivoj.
Meze de° tiom da esperantistinoj, ne *te midden van*
mirigas° ke... *het verwondert niet*
ia° amindumo aperas. *één of ander soort*
(la sufikso -umo esprimas neprecizan rilaton).

Versoj 36-35. Hispanino, Korinklino

Kio okazas nun?

Jen ies apero ! Kaj la koro ne restas indiferenta° ! *ongeïnteresseerd*
Jen ne estas malfacile diveni° kio estas *raden*
okazanta !

Verso 37. Kaj esperoj
Pri kio?
Facile divenebla°, ke... *te raden*
la korinklino povos trovi respondon, konduki al plia interkonatiĝo°. *wederzijdse kennismaking*

Verso 38. Amleteroj.
Kial leteroj?
Evidente° ĉiu reiris hejmen, sed *blijkbaar*
kun la firma° intenco resti en kontakto. *vaste*

Versoj 39-40. Mielo, Ĉielo!
Kio estas **mielo**?
PIV: sukera, odora nutraĵo, ellaborata de iuj insektoj, precipe de abeloj°, el la *bijen*
suko° de floroj, por nutri la larvojn. *sap*
Kion sugestas tiu vorto?
grandan feliĉon.
Kio estas la **miela tempo**?
la unua tempo post la geedziĝo°. *huwelijk*
Flati per **mielaj vortoj**. = ?
per ne **sincere° dolĉaj** vortoj. *oprecht*

Versoj 41-42. Edzino; FINO !!
La vorto **'edzino'** signifas ke ili...
geedziĝis.
N.B.: Viro iĝas edzo: li edziĝas. Virino iĝas edzino: ŝi... edziniĝas. Kaj por ambaŭ°: *beide*
Ili... geedziĝas.
Ĉu jen fino de la rakonto?
Ĉiu imagu por si mem !
Ĉu li estontece vivos en tiu lando aŭ ĉu la duo, la paro reiros al la lando de nia heroo?

ZAMENHOF

Pri 'mielo' (verso 39).
Ne gutas mielo el... la ĉielo.
Por ĝui ion, oni mem klopodu°, *proberen*
penu°. *moeite doen*
Oni ne atendu helpon de iu ajn.
Urson al mielo oni ne tiras per orelo.
Atentu: nun oni diras: *je* la orelo
Laŭlitere°: *Naar (de) honing toe trekt men een beer niet bij zijn oor.* *letterlijk*
Kial ne?
Ĉar mielo altiras° urson... *aantrekken*
per si mem. Oni ne bezonas treni la urson.
Jen proverbo° dirinda kiam? *spreekwoord*
Kiam io estas sufiĉe alloga° per si mem. *aanlokkelijk*
Lango miela, sed koro kruela°. *wreed*
Dirinda pri kiu?
hipokritulo, falsulo.

Pri edziĝo.
Ĉiu 'li' havas sian.... 'ŝi'.
Komparu nederlande: *Op elk potje past een deksel.*
Tro rapida edziĝo – ...
porĉiama° kateniĝo°. *voor altijd;geketendheid*
Ĉu malrapida edziĝo donus grandan liberecon?
Ŝtelu malproksime,... edziĝu proksime.
Ĉu vere?
Kiel klarigi tian ideon?

Noteto por perfektiĝemuloj: *"perfectionistisch geneigden"*
Lerni flue retraduki ĉiujn nederlandajn etliterajn° tradukaĵojn. *in kleine letters*

TRADUKEKZERCOJ

Antaŭa

1) Jen alvenas malforta kandeleto: la mallumo (tenebro) jam ne plu estas totala.
2) Malmodesteco estas stranga malsano, ĝi abomenigas ĉiujn, sed ne la malsanulon.
3) Malsato aŭ pasio faras el leporo leonon.
4) Eĉ libero ne estas beno kiam la ventro malplenas.
5) Malbona herbo ne timas la froston.
6) Malbonulon la diablo ne prenas.
7) La malbonon oni daŭre/senĉese rememoras, la bonon ne.
8) Kion la leĝo malpermesas, tio daŭre plaĉas.
9) Kion Parizo aplaŭdas, Berlino mallaŭdas.
10) Kion la saĝulo ne komprenas, (tion) la malsaĝulo ofte divenas.

Nova

1) De almanak en de krant brengen de leugens in het land.
2) Propaganda is de kunst om de ander te laten geloven wat je zelf niet gelooft. (Huizinga).
3) Het enthousiasme van de toehoorders uitte zich in luide bijvalsuitingen.
4) Zijn ontslag vragen om redenen van gezondheid.
5) Lang is de weg door lessen, kort en doeltreffend door voorbeelden. (Seneca).
6) Hij liep met de lip op het derde knoopsgat (met een hangende pruilende lip).
7) Soms spreekt het gevoel sterker dan het verstand.
8) Iedereen wordt dichter, tot de meest prozaïsche toe, als de liefde hem bevangt (Plato).
9) Wat is liefde? De behoefte aan zichzelf te ontsnappen. (Baudelaire).
10) Men vangt meer vliegen met een lepel honing, dan met een vat azijn.

E. Van Damme - Albert I-straat 44 - B- 1703 Schepdaal

DE TAAL EN DE STIJL VAN ZAMENHOF

